3de ARBEIDERS
OLYMPIADE
ANTWERPEN
25 JULI-1 AUGUSTUS 1937

IIIa LABORISTA OLIMPIADO

1937

25 JULIO - 1 AŬGUSTO

Konciza Gvidilo tra Antverpeno

Vizitu dum via restado en Antverpeno
la grandajn magazenojn

A L'INNOVATION

NOVAJOJ
FARITAJ VESTAJOJ
MEBLARO
ORNAMAJOJ

◆

Unuaranga Restoracio

Tagmanĝo je 9 kaj 12 frankoj
kaj laŭ manĝokarto

TEA-ROOM — SODA FOUNTAIN
Unuaklasa konsumado
Tre favoraj Prezoj
Ĉiutage Koncerto de la 3 1/2a ĝis la 6 1/2a

◆

A l'INNOVATION
Meir, ANTVERPENO
Vendas plej malkare el la tuta lando.

4

Enkonduka Vorto de la Urbestro C. HUYSMANS

La Antverpena urbestraro ĝojas pri la fakto ke nia urbo estis elektita por la organizado de la IIIa Laborista Sport-Olimpiado. Estos por nia loka komercista kaj butikista samurbanaro eksterordinara okazo kontribui dum proksimune ok tajoj al la loĝado kaj nutrado de aparta kontingento de 40 000 vizitantoj. Sportuloj kun parencoj kaj amikoj, el ĉiuj landoj de Eŭropa renkontiĝos do en Antverpeno en 1937, de la 26a de Julio ĝis la 1a de Aŭgusto. Sen ia dubo ili profitos sian restadon por admiri la vidindaĵojn de nia metropolo. Multnombraj estas la artaj kaj turismaj logaĵoj altirantaj la atenton de la trapasanto tra Antverpeno: la haveno kun siaj rodo, dokoj kaj kajoj, la tuneloj sub la Skeldo, la panoramo de sur la «Tura Konstruaĵo», la Plantina presejo, la muzeoj, la preĝejoj kiel la Katedralo enhavanta ne malpli ol tri majstroverkoj de la fama Petro Paŭlo, la preĝejo de Sta Jakobo kun la tombo de Rubens, la ĉiekonata Zoologia Gardeno kun kolekto de 5.000 bestoj, la pentrinda Norda Kastelo kun vastaj remejo kaj naĝejo, la popola riverbanejo laŭlonge de la maldekstra Skeldobordo, niaj parkoj, kaj cetere. Mi tie-ĉi pri tio ne tro multe insistos, ĉar aliloke en tiu-ĉi broŝuro vi trovos pli detalajn informojn.

Ankaŭ la ĉirkaŭaĵoj de Antverpeno verŝajne instigos al lernigaj kaj amuzaj eksursoj, ĉu supre, ĉu malsupre de la riverego, ĉu oni iros al la «Polders», al la Kampinoj, al la Lando de Waas, aŭ pli volonte al la provincaj urbetoj kiel Lier kaj Mehleno.

Cu post la fakuloj mi faru je mia vico laŭdan paroladon pri la sporto, ĝia celo, utilo, estado kaj fina celado, pri la disvolviĝo de la laborista sportmovado? Ne, mi nur sencele ripetadus.

Rigardante laŭ socia vidpunkto, oni povus esprimi la konsideron ke la sporto pli longe ne plu estas la privilegio, nek la tempopasigo de iu pli rajtigita klaso.

Depost la leĝa reguligo de la labortempo, la daŭro de la taga deĵoro ne plu dependas de la bonvolo de tiuj disponi-

SPORTO, SUNO KAJ AKVO!

Oostende

projektis por
via vizito
SEZON- KAJ
SPORTFESTOJN

GOLFO
TENISO
VELADO
NAĜADO
REMADO
SKERMADO
FIŜKAPTADO
ĈEVALKURADO
VETKUROJ
CONCERTOJ en la
KASINO-KURSAAL

Vizitu la Banpalacon, Resanigejon,
la Trinkhalon en Leopoldparko,
la Muzeon Fort-Napoleon.

Informoficejo: Vlaanderenstraat, 66a. 1

gas la laboron. Profiti la liberan aeron, la sunbrilon, la fluantan akvon, signifas jam pli ol nura distraĵo, ol iu malstreĉiĝo por tiuj kiuj devas pasigi la tagon en fabrikoj laborejoj, kontoroj, ĝi signifas korpa revivigo kaj sano.

Kiam krome, ili ekzercas iun fakon de la sporto — gimnastiki, naĝi, remi — adaptita al ilia kutima okupado, ili samtempe malhelpos la misformadojn kaj malsanojn kiuj influas al ili kaŭze de sia metiekzercado.

La sporto signifas ankoraŭ ion pli ol nura zorgado pri la korpo: ĝi kontribuas al la spirito de sindisciplino, de reciproka kamaradeco, de samcelado — moralaj ecoj kiuj antaŭpreparas nin al la devo kiun ni devas priatenti kontraŭ la ŝtato kaj la komunumo al kiuj ni apartenas.

Niaj kamaradoj povas resti konvinkitaj ke la «Bonvenon fremdulon» ne estas vana vorto en Antverpeno. Ankaŭ la gastameco estas unu el la Antverpenaj tradicioj.

La tuta urbanaro de Antverpeno jam de nun alte taksas la favoron povi saluti kiel siajn gastojn la milojn, kiuj okaze de la IIIa Laborista Sportolimpiado troviĝos dum la venontaj monatoj inter la muroj de la Skeldurbo.

CAM. HUYSMANS,
Urbestro de Antverpeno



SARMA

RESTORACIOJ

ANTVERPENO

12, Carnotstraat (apud Centra Stacidomo)

Supo	Fr. 0,50
Antaŭmanĝaĵoj	» 1,50
Tagmanĝaĵoj	» 4,50
Bokbiero	» 0,75

6, Nationalestraat (apud Katedralo)

Bifsteko kun frititaj terpomoj	Fr. 4,50
Porkkotleto	» 4,50
Viandmiksaĵo (malvarma)	» 4,50
Kafo	» 0,50

3

Historia Skizo

En la daŭro de la tempoj, Antverpeno, kreskiĝante, iĝis metropolo, kiu nuntempe kovras surfacon da 8646 Hektaroj. Kun siaj antaŭurboj Antverpeno nombras nun proksimume 600 mil da loĝantoj.

Kamparanoj de Franca deveno starigis la unuan loĝantaron de Antverpeno.

En la komenco de la IXa jarcento la Antverpena fortika kastelo estis detruita de Nordlandanoj. En la Xa jarcento ĝi estis rekonstruita. La fudamento de la nuna « Steen » datumas de tiu sama epoko.

Ĝis en la XVa jarcento la Antverpena komerco konformiĝis pli al lokaj bezonoj ol al la internacia trafiko.

Post la ruiniĝo de Bruĝo, Antverpeno ekprosperis. La malkovroj de la Nova Mondo, kaj precipe de la nova transmara vojo al Indio translokigis la komercan centron de la Mediteranea maro al la Atlantika Oceano.

Laŭ la paroloj de Ludoviko Giucciardini, Italia komercisto kaj historiisto, Antverpeno baldaŭ iĝis la komuna patrolando de ĉiuj nacioj.

Tui-ĉi unua periodo da prospero daŭris ĝis la fino de la XVIa jarcento.

La fino de la XVa jarcento konas la tagiĝon de la gloro de Rubens. La dungitoj de Alva ĵus forlasis la landon, la ekonomia ruiniĝo de Antverpeno iĝis



La Turo
de la Katedralo

LE PEUPLE

QUOTIDIEN SOCIALISTE

rue des Sables, 33-35, BRUXELLES

Politique - Economique - Social

ARTS, LITTERATURE, THEATRES

Chroniques variées :
médicales, scientifiques
de la mode
culinaires
etc.

« A TRAVERS LE MONDE » :
Feuilletons
Contes et Nouvelles
Pages de l'Ecran, du Foyer,
Agricole, etc.

TOUS LES SPORTS — T.S.F.
Sept éditions par jour
6, 8 et 10 pages

Pénètre dans tous les milieux
Publicité de très grand rendement
Demandez ses tarifs !

Téléphones : 17.11.12 à 17.11.19

2

fakto. La XVIIa jarcento iĝas tiu de Rubens kaj liaj disĉiploj.

Ankaŭ Plantin loĝigis sian familion en Antverpeno. La « Moretus » oj daŭrigis la taskon de la fama presisto. Sed jam malheliĝas la lastaj briloj de la humanismo...

Antverpeno plurfoje suferis pro fremdula subpremado.

Periodoj plenaj da gloro kaj da travivaĵoj-ĉiuj tiujĉi jarcentoj lasis siajn impresojn en la koro de Antverpeno-sur preĝejoj, ligodomoj, patriciaj domoj. En muzeoj kaj preĝejoj, la spirito de la pli malnovaj artistoj ankoraŭ postvivas sur pluraj pentritaj tolaĵoj, sur pluraj skulptitaj paneloj.

Pentrinda angulo en la Havenkvartalo

Ĉirkaŭ tiu-ĉi pitoreska Antverpeno iom post iom disvastiĝis novaj kvartaloj en kiuj la vivo urĝas kaj bruegas tra larĝaj stratoj vastaj aleoj, laŭlonge de kiuj vidiĝas la monumentaj fasadoj de brilantaj vendejoj, teatroj, bankoj, asekur' — kaj marveturaj asocioj.

LA HAVENO

Sur la dekstra bordo de la « Sheldo » rivero, je 88 Km. de la maro, troviĝas la haveno. La plej grandaj marŝipoj sen malhelpo povas atingi la rodon, kiu apud Antverpeno estas 500 m. larĝa.

La haveno konsistas el la enstalaĵoj laŭlonge de la rivero kaj la, norde de la urbo, trans kluzoj atingeblaj internaj dokoj.

En la profunda akvo, laŭlonge de la riverbordo estas konstruitaj kajomuroj mezurantaj kune 5,5 Km. La longeco de la albordiĝejoj laŭlonge de la dokaj kajoj estas 41,5 Km. La per akvo kovrita surfaco de la dokoj, nekalkulante tiun de la rodo mezuras 371 Ha.

En normaloj periodoj, jare pli ol 10.000 marŝipoj kaj pli ol 50.000 riverŝipoj en- kaj elveturas la havenon. Antverpeno disponas plie pri : 25 havendokoj (18 por marŝipoj kaj

SPORTULOJ !
legu nian
specialan
Sportkronikon
17

La Wallonie
GRAND QUOTIDIEN BELGE D'INFORMATION
EST LU PARTOUT ET PAR TOUS
Bureaux : 53, rue de la Régence, Liége
BELGIQUE



Sargpontoj da 200 tunoj

7 por riverŝipoj) ; 12 riparejaj dokoj ; 800 Km. da duoblaj fervojoj, aro da 35 urbaj trenŝipoj (uzataj nur en la internaj havendokoj) 24 pneùmatikaj grenelevatoroj ; 632 arganoj havantaj levopovon variante de 1 1/2 ĝis 150 tunoj, inter kiuj estas pluraj flosantaj arganoj kaj elektraj ŝarĝpontoj kun levopovo da 15 tunoj. Plue 75 Ha. da subtegmentaj kajoj, grenejo kun enhavpovo da 350.000 Hl. ; 78 Ha da terenoj sur kiuj troviĝas 341 petrolejoj mezurantaj kune 475.436 m3 ; kalio-magazeno sufiĉe granda por enhavi 150.000 tunojn ; kaj la urbaj provizejoj kaj magazenoj havantaj surfacon da 200.000 m2. Sur diversaj lokoj la novaj dokoj ofte estas 300 m. kaj pli larĝaj kaj 11.75 m. profundaj. 240 da regulaj marveturlinioj ligas Antverpenon al ĉiuj havenoj de la tuta mondo.

Pro sia troviĝo en la delto de Ŝheldo-Mozo kaj Rejno, kaj ne malpli pro sia moderna ekipado, la Antverpena haveno havas speciale gravan rolon en la varotrafiko de Okcidenta kaj centra Eùropo.

POR ĈIAJ SPECIALAĴOJ KAJ KURACILOJ

APOTEKO COSMOPOLITE

57, DE KEYSERLEI, 57

Antverpeno **Telefono: 326.24**

(Centra Stacidomo)

Malfermita ĉiutage de la 8a ĝis la 22a.
Speciala ekspedo per Aŭtobusoj.

10

REKOMENDITA en Antverpeno.
KAFEJO-RESTORACIO

CAFÉ DES ARTS

Angulo Frankrijklei kaj Teniersplaats

Tel. **348.95**

Bongustaj Trinkaĵoj. — Prizorgita Restoracio.

28

VIDINDAĴOJ

Urbo Domo Groote Markt.
Katedralo, monumento Appelmans kaj pumpilo Quinten Metsijs.
La Fontano « Brabo », Groote Markt.
Ligodomoj, Groote Markt.
Muzeo « Vleeschhuis ».
Muzeo « Steen », Van Dijckkaai.
Lerneja Muzeo, Hofstraat, 13.
Preĝejo Sta Paŭlo, Veemarkt.
Pilotejo, Tavenierskaai.
Domo de la Bierfaristoj, Brouwersstraat, 20.
Reĝa Akademio de Belartoj kaj Alta Instituto, Mutsaertstraat.
Ĉefbilblioteko Hendriko Conscienceplein.
Preĝejo Sta Karolo-Boromeo, Hendriko Conscienceplein.
Statuo de Rubens, Groenplaats.
Kapelo Sta Nikolao, Lange Nieuwstraat, 5.
Preĝejo Sta Jakobo, Lange Nieuwstraat.
Beginejo, Roode straat, 39.
Reĝa varogvardejo, Italiëlei.
Komerca Borso.
Turokonstruaĵo, Schoenmarkt.
Poŝtejo, Groenplaats.
Muzeo Plantin-Moretus, Vrijdagmarkt.
Preĝejo Sta Andreo kaj muzeo de Folkloro, Sint Andriesstraat, 6.
Preĝejo Sta Aŭgusto, Kammenstraat, 73.
Muzeo Mayer van den Bergh, Lange Gasthuisstraat, 19.
Virgulinejo (Muzeo), Lange Gasthuisstraat, 33.
Reĝa Nederlanda Teatro, Comedieplaats.
Reĝa Palaco, Meir.
Nacia Banko, Frankrijklei.
Reĝa Flandra Operejo, Frankrijklei.
Centra stacidomo.
Zoologia Gardeno, Koningin Astridplein.
Unu el la kvar borsoj por la komerco de diamantoj, Pelikaanstraat, 78.
Juĝeja palaco, Britsche lei.
Muzeo por marveturado, Coquilhatstraat, 16, kaj Pli Alta Komerca Instituto.
Reĝa Muzeo de Belartoj, Leopold de Waelplaats.
Preĝejo Staj Miĥaelo kaj Petro Amerikalei.
Suda Stacidomo.
Botanika Ĝardeno, Muzeo de Natursciencoj, Leopoldstraat.
Parko Reĝo Alberto.
Konstruaĵo de la « Diamantklubo ». La plej malnova Diamantklubo de Antverpeno, Pelikaanstraat, 58.
Oficiala kontoro por Turismo, Leysstraat, 9.
Urba festsalono, Meir, 78.

SANO ESTAS RIĈECO

DENICOTEA

Garantias al vi :

SANAJN PULMOJN

FRESAN BUSON

FORTAJN NERVOJN

Ĉiam fumu kun DENICOTEA

kiu komplete forsorbas la tabakvenenojn :

nikotinon, piridinon, amoniakon, metialkoholon, prusan acidon, k.c.

Provu la « **DENICOTEAN** » **PIPON.** 21

Vizitu la

LAKT-RESTORACION DE LA URBA PARKO

(Direkcio: GUILLAUME PAUWELS)

RUBENSLEI — Centro de la Urbo

FIVE O'CLOCK TEA

Sabate, Dimanĉe kaj Lunde : DANCADO

Malvarma kaj varma Bufedo. **20**

En Antverpeno ni rekomendas al vi la

KAFEJON-RESTORACION-HOTELON

HOTEL REGINA

11, De KEYSERLEI, 11

Agrabla kaj moderna Hotelo.

Bongustaj Trinkaĵoj. — Bonega restoracio.

27

KONCIZAJ INFORMOJ PRI MONUMENTOJ KAJ VIDINDAĴOJ

SERVO POR PROPAGANDO KAJ TURISMO
Leysstrato 9-11. Telefono 201.03.

Tute je la dispono de vizitantoj, kiuj povas konsulti gvidfoliojn, broŝurojn kaj planojn. ne nur pri Antverpeno sed ankaŭ pri aliaj turismaj centroj ; adresarojn, telefonlibrojn, vojaĝ-kaj fervojgvidilojn kaj ĉian praktike utilan dokumentadon. Ĝentile kaj nepre senpage ili estas informataj pri muzeoj, vidindaĵoj, preĝejoj. loĝado kaj speciale pri ĉio kio povos igi pli agrablan kaj utilan, ilian restadon en Antverpeno.

URBODOMO: Groote Markt.

Konstruita laŭ Renaskiĝa stilo kaj inaŭgurita la 27 an de Februaro 1565. En 1824 kaj 1858 diversaj partoj estis riparitaj aŭ novkonstruitaj. De 1880-1884 la interno estis renovigita kaj la novaj salonoj ornamitaj per murpentraĵoj.

LIGODOMOJ

Sur la Groote Markt troviĝas kelkaj belaj fasadoj.

FONTANO BRABO

Verko de Jef Lambeaux (Jef Lambo) 1852-1908.

Karakteriza kaj fantaziriĉa reprezentaĵo de la legendo pri la deveno de Antverpeno ; Brabo ĵetante en la Sheldon la dehakitan manon de la giganto Druon Antigoon.

REĜA MUZEO DE BELARTOJ (Leopold De Waelplaats).

Ĝi enhavas riĉan kolekton da verkoj de diversaj skoloj : la malnovaj kaj novaj Flandraj Majstroj estas abunde reprezentataj.

MUZEO PLANTIN-MORETUS (Vrijdagmarkt)

Iama loĝejo kaj laborejo de la fama presisto Kristoffel Plantin (1520-1589) Liaj posteuloj la familio

Du historiaj Fasadoj

Ĉiuj al
NEC PLUS ULTRA
DE KEYSERLEI, 2, ANTVERPENO
Famekonata por
sia aroma taso da KAFO
siaj bongustaj BRUSELAJ VAFLOJ
siaj delikataj GLACIAĴOJ.

Luks- kaj Panbakejo kaj delikataj Kukaĵoj
Gustumejo
Firmo Noppe-Brusselairs
JOS. BOURGUIGNON-NOPPE
Mechelsche Steenweg 169-171, Antverpeno
Telefonoj 908.79 kaj. 924.00 15

Pierre GRANDRY
Eduard Pecherstraat, 25, Antverpeno
Telefono **766.97**
Transportoj al ĉiuj landoj per fervojo, vojo kaj maro.
Formalaĵoj por la limimpostoj, enmagazenado,
liveraĵoj f.o.b., k.t.p.

En Antverpeno oni rekomendas
HOTEL CAFÉ SUISSE
Groenplaats 2-3 (apud Katedralo kaj Haveno)
Telefonoj **215 61** kaj **203.18**
Plej alte taksata restoracio
Unuakvalita konsumado — Familia Hotelo
29

Moerentorfs (Moretus) daŭrigis lian laboron kaj loĝis tie ĉi ĝis en 1876. En la muzeo estas ekspoziitaj: neegalebla kolekto da familiportretoj, gravuraĵoj sur ligno kaj sur kupro, desegnaĵoj (Ĉiuj verkoj de la plej famaj Flandraj artpentristoj) admirinde konservataj manuskriptoj, ekzempleroj de libroj aperintaj en la unuaj jaroj de la presarto kaj aliaj valoroj presaĵoj, presliteroj, luksaj mebloĵ el la XVIa kaj XVIIIa jarcentoj.

La vizitanto ankaŭ povas admiri la bone ekipitan laborejon, du presilojn el la XVIa jarcento. La interna ĝardeno faras tre ĉarman impreson.

MUZEO « STEEN » (Van Dijckkaai).

Datumante el la Xa jarcenta la « Steen » estis parto de la fortika kastelo de Antverpeno, dum ĝi nun estas muzeo de antikvaĵoj.

Legenda Forgaĵo de la Pumpilo Kwinten Metsys

MUZEO « VLEESCHHUIS » (kontraŭflanke al « Steen »).

Imposa konstruaĵo en gotika stilo starigita en 1500 por la ligo de la buĉistoj laŭ planoj de Herman de Waghemakere. En 1899 la komunuma estraro ĝin aĉetis kaj aranĝis kiel Muzeo de Metiista-kaj Ornama-artoj.

FOLKLORO MUZEO (St. Andriesstraat, 6).

Tiu ĉi muzeo estas la konservejo de ĉio, kio rilatas la Flandran popolvivon, kio apartenas al la sfero de Flandrio, kio konsistigas la propran karakteron de la Flandra popolo.

KATEDRALO.

Komencita en 1352 la konstruo de la preĝejo de Nia Sankta S^ino^ daŭris ĝis en 1543. Sendube ĝi estas unu el la plej majestaj gotikaj preĝejoj. Oni tie ĉi povas admiri la grandiozan majstrecon de Rubens per « La starigo de la Kruco », « La depreno de la Kruco », « La ĉieleniro de la Sta Mario » dum ankaŭ videblaj estas pluraj verkoj de aliaj famkonataj pentristoj.

La supreniro sur la turo (ĝis la supra galerio) plene valoras la penon pro la belega panoramo. La sonorilaro, konsistante el 47 sonoriloj, havas riĉan kaj bone agorditan tonon. De tempo al tempo okazas sonorilarkoncertoj.

GLASCO
GLACIAĴOJ
SERVO KAJ KVALITO
30

ĈU VI DEZIRAS SANAN, SENDANĜERAN
KAJ FORTIGAN TRINKAĴON
TIAM TRINKU EL LA BOTELO

La lakto kia ĝi devas esti !
23

Via Kafejo-Restoracia kaj Hotelo en Antverpeno estas
Grand Hôtel WAGNER
1, FRANKRIJKLEI (apud Flandra Operejo)
Tel. 284.30 kaj 224.68
Ĉio treege prizorgita kaj unuakvalita.
Hotelo Unuaranga — Lasta moderna komforto.
26

PUMPILO QUINTEN METSIJS (Handschoenmarkt).
Belege forĝita feraĵo datumante de 1490. Estis unue destinita por la puto antaŭ la malnova urbodomo, sed pro la konstruo de la nova urbdomo la pumpilo estis transportita al la « Handschoenmarkt ».

PREĜEJO Sta JACOBO (Lange Nieuwstraat).
Komencita en 1491, sub gvidado de Herman de Waghemakere, la konstruo de tiu ĉi preĝejo estis finita en 1624. Pro manko da mono la giganta turo restis ne finkonstruita. La preĝejo en gotika stilo de la 3a periodo aspektas tre luksa.
En ĝi ankaŭ troviĝas la tombokapelo de Rubens kaj unu el la plej konataj verkoj de la majstro. « La Sankta Familio » sur kiu li pentris la portretojn de li mem kaj de ambaŭ siajn edzinojn.

PREĜEJO SANKTA PAŬLO (Veemarkt).
Al la nuna preĝejo oni laboris ĝis en 1571. La preĝejo troviĝas en la koro de tipa Antverpena kvartalo. Karakteriza esta la tri etaĝoj alta Kalvario kun siaj nature grandaj statuoj, konstruita en 1709 kontraŭ la ekstera muro de la preĝejo en ĝin ĉirkaŭiĝanta ĝardeno.

PREĜEJO Sta KAROLO-BOROMEO.
Starigita en 1614 de la monaĥo Patro Aguillon, antaŭe opiniita esti verko de Rubens, sed ĉiu okaze ĝi portas la insignojn de lia majstreco per sia abunde luksa Renaskiĝa stilo. Antaŭ la grava brulo en 1714 ĝi estis unu el la plej belaj preĝejoj de tuta Belgio. Kolonoj el marmoro de Karara, planko kaj muroj kovritaj per plej multekostaj kaj riĉaj marmorspecoj.

Karakteriza ankaŭ estas la subtera galerio iom simila al la Romana katakomboj kun tombokapeloj kaj koridoroj, granda nombro da tomboj kaj kelkaj altaroj al kiuj diserviĝis sekrete dum la Franca

P.-P. Rubens : Starigo de la Kruco

GRAND HOTEL DE LONDRES

59, de Keyserlei, Antverpeno

Fondita en 1886. Moderna Komforto.
Famekonata por sia Restoracio kaj delikataj vinoj.
EN LA TRINKEJO: unuaranga malvarma bufedo.
Bieroj « Leopold » kaj « Heineken ».
Tel. 259.60 (7 linioj). Telegramoj: Lonhotel.

25

KUKAĴEJO LOCUS

MEIRBRURG, 3, ANTVERPENO

KAFO — TEO — ĈOKOLADO
FIVE O'CLOCK TEA

19

SPORTULOJ TRINKAS
TOP BRONNEN
la natura spruĉanta akvo de la
FLANDRAJ ARDENOJ
Top Oran! Top Citron! Top Grenadine!
Ĉiuj fabrikitaj per la AKVOJ de la
TOP BRONNEN
PURA, SANA, FRESIGA 14

Hotels TRITON & OLD TOM

De Keyserlei 66 kaj 53, ANVERPENO

Tag- kaj Vespermanĝoj je 10, 15 kaj 20 fr.
Tagmanĝoj depost 8 frankoj
Ĉambroj kun matenmanĝo depost 18 frankoj
Posedanto: Edm. Smits — Posedanto: Hub. Smits

subpremado. La placo antaŭ la preĝejo kun Urba Biblioteko kaj monumento H. Conscience estas loko aloganta per sia kvieta kaj trankvila aspekto.

CENTRA STACIDOMO
Ĉefstacidomo kiu pro sia 75 m. alta turo (arkitekto De la Censerie) faras grandurban aspekton. Tute apude troviĝas la avenuo De Keyser, kun siaj luksaj vendejoj kaj intimaj konsumejoj, grandaj hoteloj kaj vastaj kinejoj.

Preĝejo Sankta Jakobo

REĜA FLANDRA OPEREJO (Frankrijklei).
Starigita en 1907.

MEMORAĴO P. BENOIT (Frankrijklei, antaŭ la Flandra Operejo).
Planoj de ark. H. Van de Velde. Peter Benoit, famkonata komponisto, estas konsiderata kiel la fondinto de propra Flandra muzikmovado.

REĜA NEDERLANDA TEATRO (Comedieplaats).
Aro da konataj geaktoroj dum la teatra sezono (Septembro-Aprilo) estigas konstantan ludantaron. La repertorio estas jen klasika, jen moderna.

URBA TEATREJO (Italiëlei).
Estas disponebla por popolaj kaj vagantaj teatrogrupoj.

LABORISTOJ ĈIULANDAJ
unuigi vin en
« CITY AUTOMAT »
52, de Keyserlei (ĉe kinejo Capitole)
Ĉiaj garnitaj bulkoj je 1 fr.
Varmaj kaj malvarmaj manĝaĵoj, tre malkaraj.
Tagmanĝoj (supo, viando, legomoj, terpomoj kaj kompoto) je 5 ĝis 6 frankoj.
Oni parolas ĉiujn lingvojn.

CENTURY HOTEL
en la centro de la urbo
kaj je kelkaj paŝoj de la Centra Stacidomo.
Unuaranga Hotelo, 300 ĉambroj, 300 Banĉambroj
EXCELSIOR HOTEL
kontraŭ la enirejo de la Centra Stacidomo.
Ĉambroj depost **35** frankoj.
Biertrinkejo « LE PELICAN »
Malvarmo bufedo — Famekonataj bieroj 31

Se vi ŝatas bongustan kafon,
iru al la
PAN- kaj KUKBAKEJO
JOS. BOSSIJNS N.V.
Angulo Groenplaats kaj Nationalestraat, 2
(apud Katedralo)
Unuaranga TEAROOM. 200 Sidlokoj.

KOMERCA BORSO (Twaalfmaandenstraat).

Datumas de 1872 kaj troviĝas sur la sama loko kie iam staris la unua internacia borso de Eŭropo, Bela gotika konstruaĵo, starigita en 1531.

MEMORAĴO PRI LA MORTIGITOJ (antaŭ la Nacia Banko).

Monumento starigita je la memoro de la soldatoj mortigitaj dum la mondmilito.

JUĜEJA PALACO (Britschelei).

Starigita en 1869 - 1874. Stilo Ludoviko XIII.

TURO-KONSTRUAĴO (Schoenmarkt).

La unua kaj plej alta «Ĉielgratanto» kaj domo de Eŭropo. Sur la 24a etaĝo troviĝas panoramosalono.

La Turo
de la Prêgejo Sankta Karolo Boromeo

PARKOJ

MALNOVA URBOPARKO apud la Nacia Banko. Remado. Troviĝante je malpli of 5 minutoj for de la brua ĉirkûaĵo de la centra stacidomo, tiu ĉi parko, mirinde bele aranĝita, estas kvazaŭ oazo da kvieto.

NOVA URBOPARKO

(Najtingala parko. Parkoj Middelheim - kaj Brand.) Tramlinioj 2, 5, 17.

Tre vasta grandioza kaj riĉe varie aranĝita parko, kun luksa vilaokvartalo en la proksimeco.

ĈIU SPORTULO ekipas ĉe
Van Schelle-Sports
Loxumstraat, 18, BRUSELO
De Keyserlei, 30, ANTVERPENO
10% da rabato al la membroj de la Sportgrupoj

VIZITU LA ZOOLOGIAN ĜARDENON DE ANTVERPENO

Situata apud la Centra Stacidomo la Zoologia Ĝardeno de Antverpeno estas unu el la plej belegaj ĝardenoj el la tuta mondo kaj kiel tia ankaŭ ĝenerale famekonata.

La kolektoj de eksterlandaj bestoj estas treege riĉaj kaj multopaj; la instalaĵoj kaj kostruoj en kiuj ili estas ekspozataj estas modeloj; la ĝardenoj estas pentrindaj, guste plantitaj kaj zorge konservitaj.

Festhalo, Muzeo de Natura Historio, Vintra ĝardeno, Koncertoj.

Trinkhalo, Manĝosalono, Kukaĵejo, Unuaranga servado.

AKVARIO.

ZOOLOGIA ĜARDENO (Koningin Astridplein).

Kolekto da pli of 5000 bestoj, inter kiuj estas tre kuriozaj specimenoj, trovas lokon en veraj palacoj kaj modela kaĝoj. trovigantaj en tre vasta ĝardeno, riĉevaria kaj belega parko. Maloftaĵo estas la akvario.

UTILAJ ADRESOJ KAJ INFORMOJ

Poŝtejoj

ĈEFPOŜTEJO, Groenplaats 43.

Malfermata: labortage de la 8a ĝis la 19a (Sabate de la 16a ne okazas financaj operacioj) Ankaŭ Dimanĉe de la 9a ĝis la 12a kaj labortage de la 19a ĝis la 21a sed nur por poŝtmarkoj, rekomenditaj ekspedoj, poŝtpakaĵoj, urĝaj liverotaĵoj kaj telegrafaj poŝtkambioj. (Eniro: Pandstraat, sonorigu m. p.). Telefonoĉeloj.

Centra Stacidomo

HELPOFICEJOJ: Troviĝas en:

Grands Magasins « A l'Innovation », Meir 82.
Grand Bazar du Bon Marché, Groenplaats 32.
Grands Magasins de la Bourse, Meir 31.

Malfermataj de la 9-12 kaj 14-17.30. Sabate ĝis la 16a Fermetaj dimanĉe.

OFICEJOJ DE TELEFONO KAJ TELEGRAFO

ĈEFOFICEJO, Jezusstr. 11: malfermate tage kaj nokte.

CENTRA STACIDOMO (Halo), Malfermata tage kaj nokte.

CENTRA STACIDOMO, flanke de la ĉefenirejo: malfermata de 6.30-22.

ORIENTA STACIDOMO: Malfermata de 7.30-24.

SUDA STACIDOMO: Malfermata de 7-21.

JUNULAREJO JEZUITENHOF, Jan de Voslaan (fino Kolonielaan). Tram 2. Cent litoj. Tel. 744.45.

VIZITU

NORDKASTELON

Plej granda Naĝ- kaj Remejo
el **Eŭropo.**

22

Panoramo Torengebouw

Alteco 90 metroj — Lifto 1 miuto
Mirinda vidaĵo super la urbo, la haveno, k.c.

Rabato sur la tarifo por grupoj kaj partoprenantoj al la IIIa Laborista Olimpiado

13

Ĉiuj vizitu

St. Anna Riverbordon

Ĉiuj plezuroj de **Moderna Banejo**
estas prezentataj al vi

La plej granda **Luna Park**
kun magia fervojo

Malnova Brabanto
kun grandega **Dancejo**

PLEZURĜARDENO POR INFANOJ

6

Bootekskursoj

HAVENO EKSKURSOJ « FLANDRIA ». — Albordejo: Flosponto apud «Steen». Forveturoj je la 10a kaj 14a. (Sheldo kaj dokoj). Daŭro de la ekskursoj proksimume 3 horojn. (De Pasko ĝis fino de Septembro). Telefono 374.22. Ankaŭ regulaj boatservoj al Doel kaj Lilloo. Ekskursetoj laŭlonge de la rodo.

Urbaj Bad- kaj Naĝejoj

SUBTEGMENTA NAĜO: Lange Veldstraat. Malfermata la tutan jaron. Telefono 555.04. Tramlinioj 3, 12, 21, 23.

NESUBTEGMENTA NAĜEJO : Brusselschestraat (apud Suda Stacidomo) Malfermata Majo-Oktobro. Telefono 727.05 Tramlinioj 4, 18, 24.

« NOORDKASTEEL » : Okazo por remado kaj banado. Belega naturvidaĵo. Bonege aranĝita por infanoj. Refreŝigoj. Je 15 minutoj de la « Steen » per « Flandria » boatoj ; ankaŭ aŭtobusservo de Koningin Astridplein.

BANEJO SUR LA MALDEKSTRA SHELDO BORDO : Restoriacioj kaj kafejoj. Belega vidaĵo sur la rodo kaj la Sheldo. «Luna» Parko. Malnova Brabanto. Nesubtegmenta naĝejo. Tendumterenoj. Telefono 347.31. Tunelo por piedirantoj, pramoj, motorboatejoj ĉe flosponto « Steen » kaj « Noordkasteel ». « Flandria » boatoj : ankaŭ aŭtobuso ĉe Koningin Astridplein.

Rilatoj kun la maldekstra Skeldobordo

TUNELO POR PIEDIRANTOJ. Entro dekstra bordo (Kleine Tunnelplaats). Longeco: 570 m. Ekstera diametro de la tuta tubo: 5,40 m. Interna diametro: 4,30 m. Utila larĝeco de la trotuaro : 3,80 m. Enirebla sur ambaŭ riverbordoj per reliĝantaj ŝtuparoj, ankaŭ per du liftoj.

Inaŭgurita en Septembro 1933. Transirprezo 0,50 fr.

27

La Rega Palaco

HOE VOORAF LOGIES BESPREKEN ?

Bijgevoegde kaart, moet ingevuld en afgescheurd teruggestuurd worden met het juiste bedrag aan het **Komiteit voor Huisvesting**, gevestigd : Ommeganckstraat. 49, Antwerpen. Het bedrag en het bericht moeten minstens 48 uren vóór de aankomst der reizigers op onze Bureelen toegekomen zijn. Voor groepen van meer dan 10 personen 8 dagen op voorhand. Alle geldzending moet gebeuren aan 3e Arbeiderssport-Olympiade, Antwerpen. Postcheck nr 4345.80.

BERICHT. — In geval het Komiteit zich in de onmogelijkheid zou bevinden om het gewenschte logies te bezorgen en er geen tijd meer is om de reizigers nog te verwittigen, zal er ander logies voorbehouden worden ; echter zonder eenige verantwoordelijkheid voor het Komiteit.

POUR RESERVER DU LOGEMENT

La carte ci-jointe doit être remplie, détachée et renvoyée avec le montant exact au **Comité de Logement**, rue Ommeganck, 49, Anvers. Le montant et l'avis doivent parvenir au bureau au moins 48 heures avant la date d'arrivée des voyageurs. — Pour les groupes de plus de 10 personnes 8 jours à l'avance. Tout envoi de fonds doit se faire à 3e Olympiade Ouvrière, Anvers. Compte-chèques nº 4345.80.

AVIS.— Au cas où le Comité se trouverait dans l'impossibilité de fournir le logement désiré et d'en prévenir en temps utile les voyageurs, un logement d'une autre catégorie sera réservé, mais sans aucune responsabilité pour le Comité.

LODGINGS TO BE RESERVED ?

The joining card must be filled out and sent in along with the exactt amount to the **Committee of Lodgings**, Ommeganckstreet, 49, Antwerp. The amount and Notice must reach our Offices 48 hours before arrival of the Travellers. — For groups of more than 10 persons, 8 days in advance. All amount must be sent at the IIIrd Workerssport Olympiade. Postchecque 4345.80.

NOTICE. — In case the Committee is unable to provide for the rooms wanted, and no time is left to warn the travellers, rooms of another class will be reserved, without any responsibility on the part of the Committee.

ZU RESERVIERENDE UNTERKUNFT ?

Die Begeleitkarte ist auszufüllen und mit beigefügtem Genaubetrag dem Unterkunftkomitee einzusenden Antwerpen, Ommeganckstrasse, 49. Der Betrag und Avis müssen in unserem Besitz sein wenigstens 48 Stunden vor Ankunft der Reienden. — Für gruppen von mehr als 10 Personen, 8 Tage im voraus. Der Betrag muss adressiert werden an IIIe Arbeitersport Olympiade. Postcheckkonto 4345.80.

NOTIZ — Falls das Komitee die verlangten Zimmer nicht zur Verfugung hat, und die Reisenden nicht zeitig mehr benachrichtigt werden können, werden Zimmer einer anderen Klasse reserviert, jedoch ohne Verantwortlichkeit für das Komitee.

TUNELO POR MOTORVETURILOJ. Eniro dekstra bordo (Groote Tunnelplaats, apud Italiëlei). — Longeco 2110,85 m. Ekstera diametro 9,40 m. Interna diametro : 8,70 m. Utila larĝeco de la vojo 6,75 m. Utila alteco en la tunelo : 4,465 m.

ŜTATA PRAMSERVO : Flosponto apud « Steen » simpla transveturo : 0,40 fr.

La Tura Konstruaĵo (88 M.)

LUAŬTOMOBILOJ
Tarifoj por Tago kaj Nokto

VETURILOJ

I. Veturiloj havantaj 3 sidlokojn por vojaĝantoj : 2 fr. par la unuaj 300 m. aŭ 4 1/2 minutoj da atendo ; ĉiuj pliaj 200 m. aŭ 2 minutoj da atendo po 0,30 fr.

II. Veturiloj havantaj almenaŭ 4 sidlokojn por vojaĝantoj : 2,50 fr. por la unuaj 300 m. aŭ 4 1/2 minutoj da atendo ; ĉiuj pliaj 250 m. aŭ 3 minotoj da atendo po 0,50 fr.

Pakaĵo :

Pezaj aŭ ĝenantaj kofroj kaj pakaĵoj po 1 fr., maksimumo 5 fr.

FIAKROJ :

I. Fiakroj kun unu jungita ĉevalo : unua duonhoro 10 fr. ; ĉiu plia kvaronhoro po 3,50 fr.

II. Fiakroj kun du jungitaj ĉevaloj 50 % pli ol la tarifo por fiakroj kun unu ĉevalo.

Esperantoteksto prizorgita de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj, Sekcio Antverpeno.
Sidejo : Popoldomo, Antverpeno.

RISKU VIAN ŜANCON

EN LA

BELGA KOLONIA LOTERIO

• •

La Kolonia Loterio estis permesita laŭ la leĝo de la 29a de Majo 1934 profite de Belga Kongo. Ĝia sidejo estas 56, Gulden-Vlieslaan, Bruselo.

La Belga Kolonia Loterio eldonas monate serion de 25 milionoj da frankoj en 500 000 biletoj po 50 frankoj, numeritaj de 100.000 ĝis 599.999.

60 % de la eldonita sumo estas destinita por la lotoj, laŭ la plano troviĝanta sur la dorsflanko de la biletoj.

Ĉiumonate okazas lotado de la allima serio, tiuj lotadoj okazas publike.

Krom la montrado de la buloj, portantaj la lotitaj ciferoj kaj la enmetado de la buloj en la rulon, ĉiuj aliaj loteriaj faroj okazas sen uzo de la manoj.

La ruloj estas movataj elektre. La eliĝo de la buloj okazas elektre pere de manilo firmigita al la aparatoj per kablo sufiĉe longa por ebligi la prezentadon de la manilo al la ĉeestantoj kiuj kaŭze de tio ageme kaj direkte partoprenas la lotadon.

La tuta lotado, depost la enmetado de la buloj en la rulon, ĝis kiam ili estas elprenitaj post la lotado, okazas sub la direkta kontrolo de la Komitato de la Loterio kaj de ĵura asignisto.

Ĉiu povas, ĉe la sidejo de la Belga Kolonia Loterio, havigi al si lotojn, sendante al la Direkcio de la Kolonia Loterio, 56, Gulden-Vlieslaan, Bruselo, ĉu postkambion, aŭ bankĉekon, ĉu alpagon sur la poŝtĉekkonto 71.60 de la Kolonia Loterio, tiomfejo 50 frankojn (10 belgoj) kiom oni deziras ricevi lotojn, krom la sendkostoj per rekomendita letero kaj la alsendo de la loteriliston tuj post kiam la lotado okazis.

RESUMO DE LA REGULARO

Kiam en la lotado unu sama numero eliras pli ol unu fojo la unuiĝo de la lotoj estas permesata, krom la kazo kiam la sorto aljuĝas samtempe al la sama bileto plurajn lotojn de unu miliono aŭ pli.

En tia kazo nur la plej grava loto estas aljuĝata al la gajnanta numero kaj oni procedos al nova aljuĝo de la unu aŭ de la pluraj disponeblaj lotoj.

Se okaze bileto de la Loterio aŭ deponbileto estus perdita, aŭ malaperita, aŭ ŝtelita, meniu plendo nek kontraŭstaro estos akceptata.

La Loterio nur rekonas la posedanto de la bileto, t.e. la portanto de la nomita bileto. Portantoj de kartoj aŭ de subdividoj de bileto havan neniun rajton kontraŭ la Loterio.

Estas konsiderataj kiel malregulaj kaj povas esti pagataj nur post aŭtorizo de la Direkcio de la Loterio, ĉiu bileto malpurigita, aŭ traborita, aŭ malkompleta aŭ riparita per gluo.

La personoj loĝantaj ekster Belgio povas akiri pagon de la gajnantaj biletoj sendante al la Direkcio de la Kolonia Loterio, 56, Gulden-Vlieslaan, Bruselo, la gajnantajn biletojn per rekomendita aŭ asekurita letero.

La sumo estos al ili sendata, senia depago krom la sendkostoj, per internacia poŝtkambio.

La gajnantaj biletoj, ne prezentitaj por pago dum la tempodaŭro de ses monatoj, depost la tago de la lotado, estas deklaritaj maltaŭgaj kaj la korespondantaj sumoj restas akiritaj al la Loterio.

18

LOGIES. — GEMIDDELDE PRIJZEN

Dienst - taks (onkosten inbegrepen) per dag en per persoon :

Hotels, klas A : kamer voor 1 persoon : 30 Belg. fr. ; id. voor 2 personen : 50 Belg. fr.

Hotels, klas B : kamer voor 1 persoon : 20 Belg. fr. ; id. voor 2 personen : 30 Belg. fr.

Bij partikulieren, klas C : kamer voor 1 persoon 20 Belg. fr. ; id. voor 2 personen : 30 Belg. fr.

Jeugdherberg : Eenheidsprijs : 5 Belg. fr.

LOGEMENTS. — PRIX MOYENS

Service - taxe (frais compris) par jour et par personne :

Hôtels, classe A : Chambre pour 1 personne, 30 fr. belges ; id pour 2 personnes, 50 fr. belges.

Hôtels, classe B : chambres pour 1 personne, 20 fr. belges ; id. pour 2 personnes, 30 fr. belges.

Chez particuliers, classe C : Chambre pour 1 personne, 20 fr. belges ; id. chambre pour 2 personnes, 30 fr. belges.

Auberge de jeunesse : Prix unique : 5 francs belges.

LODGINGS. — AVERAGE PRICES

Service - taxes (all cost included) for one day and for one person.

Hotels, class A : Bedroom for 1 person 30 Belgian Frs ; Bedroom for 2 persons, 50 Belgian Frs.

Hotels, class B : Bedroom for 1 person 20 Belgian Frs. ; Bedroom for 2 persons 30 Belgian Frs.

In private houses, class C : Room for 1 person, 20 Belgian Frs. ; Room for 2 persons, 30 Belgian Frs.

Youth hotel : Unic price : 5 Belgian Fr.

UNTERKUNFT. — DURCHSNITTPREISE

Bedienung - Steuer (einschlisslich aller Spesen) pro Tag und pro Person.

Hotels, Klasse A : Zimmer 1 person, 30 Belg. Frs. ; Zimmer 2 persons, 50 Belg. Frs.

Hotels, Klasse B : Zimmer 1 person, 20 Belg. Frs. ; Zimmer 2 persons, 30 Belg. Frs.

Bei Privatleuten, Klasse C : Zimmer 1 person, 20 Belg. Fr. ; Zimmer 2 persons, 30 Belg. Fr..

Jugendherberge : Einzelpreise : 5 B. Fr.

Imprimerie Excelsior, s.a. (J. Luys), r. Somers, 22, Anvers.



Imprimé en Belgique